

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 5-6/1983 ★ Kr 6,50



## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,  
Telefon: 08-11 74 34.  
EsperantoCentro är öppet  
måndag-torsdag kl. 17-19.  
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-  
förbundet.  
Medlemsavgift:  
Direktansluten medlem 65 kr,  
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,  
familjemedlem (utan tidning) 25 kr:  
Prenumerationsavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften.  
Medlemmar under 30 år får dessutom  
ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

## SEF:s styrelse

Ordförande: Roland Lindblom  
tel. 08-777 41 75,  
Sekreterare: Anita Lindblom  
tel. 08-773 40 24,  
Kassör: Karin Lindquist  
tel. 0589-155 31,  
Märtha Andreasson, Niklas  
Gustafsson, Kerstin Rohdin,  
Birger Viggen.  
Suppleanter:  
Ingemar Nordin, Åke Rohdin.

## La Espero

Organ för Svenska  
Esperantoförbundet.  
Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.  
Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.  
Redaktion:  
Karin Lindquist (huvudansvarig)  
Vasagatan 8C, 732 00 Arboga,  
tel. 0589-155 31.  
Ulf Ribers, Norra Freberga,  
591 90 Motala, tel. 0141-220 35.  
Bertil Danielsson (layout)  
Årjäng, tel. 0573-105 69.  
Fotosats och tryck:  
EsperantoCentro, Stockholm 1983.  
Manuskript sändes en månad före  
utgivningsdatum till  
Karin Lindquist (adress se ovan).

## Esperantoförlaget

Postadress:  
Box 7502, 200 42 Malmö.  
Besöksadress:  
Möllevångsgatan 20 B.  
Öppettider: 1 sept.-15 maj:  
onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.  
Skriftliga beställningar expedieras  
hela året, även under sommaren.  
Telefon: 040-12 20 29.  
Postgiro: 578-5.  
Expedition: Wivi Nilsson.  
Styrelsens ordförande:  
Anita Lindblom.



# Ny redaktionskommitté tar hand om *La Espero*

LA ESPERO har fått ny redaktionskommitté. Det som Franko Luin under många år skötte själv, är nu uppdelat på flera personer.

Karin Lindquist (f d Strandberg), Arboga, har huvudansvaret för att material kommer att flyta in till tidningen och dessutom att tidningen utgives enligt uppgjord tidsplan.

Ulf Ribers, Motala, har många idéer om innehållet i tidningen och kommer också att bidra med ett antal artiklar av varierande slag. En tredje person sökes till kommittén – gärna någon språkexpert och gärna någon med hemort i stockholmsregionen. Det sista inte helt nödvändigt. Förslag på sådan person mottages tacksamt!

Bertil Danielsson, Årjäng, har åtagit sig att göra det hela till en tilltalande tidning – han blir vår "pågarangisto".

Sättning och tryckning kommer som tidigare att ske på EsperantoCentro. Detta och nästa nummer sättes dock av Sten Öfors och Sven Lundgren.

Eftersom vi ser LA ESPERO i första hand som ett informationsorgan för esperantorörelsen, är det viktigt att den blir det hjälpmedel, som klubbar och enskilda behöver för att föra esperantos idé framåt. Vidare är det viktigt att man skall förmedla de erfarenheter som finns på olika håll,

att man skall ge hjälp att argumentera för Esperanto och att man skall informera om vad som händer inom esperantorörelsen både i Sverige och utomlands.

Vi kommer vid ett par tillfällen under året att ta fram TEMA-nummer med anknytning till Esperanto. Vi tycker det är värdefullt att just DU får tillfälle att yttra dig om någon esperantoangelägenhet som är värd att förmedla och debattera. Därför blir det en INSÄNDARSPALT. Skriv kort och koncist på esperanto eller svenska!

Vi har gjort upp en utgivningsplan, som det är vår ambition att hålla:

nr 7/8 1983	15 december	nr 5	15 juni
nr 1 1984	30 januari	nr 6	30 augusti
nr 2	28 februari	nr 7	15 oktober
nr 3	30 mars	nr 8	30 november
nr 4	30 april		

Allt detta kan inte redaktionskommittén själv fullfölja utan er hjälp kära läsare! Det är genom er medverkan som LA ESPERO blir den tidning SOM ALLA VILL HA!

Redaktionskommittén

Tänk på att en bra artikel blir ändå bättre om den livas upp med en bild! Sänd därför svart/vita bilder!

## Ĉu vi permesas? La prezidanto:

Hodiaŭ estas la tago de Unuiĝintaj Nacioj, la 24an de oktobro. En la ĵurnalo Dagens Nyheter aperis relative granda »anonco», kiun SEF aperigis kaj pagis. Temas pri tiu teksto, kiun vi povas legi sur la lasta paĝo de tiu ĉi numero. Kun kelkaj helpantoj, ekde frua printempo, ni sukcesis kolekti subskribojn de pli ol sepdek simpatiantoj.

En la nuna momento ne eblas taksi la valoron de tia reklamformo por atentigi pri esperanto, sed mi konstatis ke miaj oficejaj kolegoj estis impresitaj.

Kiam ni petis pri la subskriboj ni ne postulis ion alian ol subtenon de la mesaĝo. Per tio mi volas atentigi ke ni ne rajtas trouzi tiujn homojn, ĉar ili estis afablaj konsenti pri apogo.

La Espero estas maljuna organo en la internacia movado, kaj ĝi travivis plurajn redaktorojn. Nun estas momento de ŝanĝiĝo. Franko Luin iam transprenis la respondecon provizore post Åke Blomberg kaj nun finiĝas la 'provizora' periodo. Ni kore dankas al Franko, kiu dediĉis tiom da horoj por liveri belaspektan kaj enhavoriĉan gazeton. Ni povis dum jaroj legi en aliaj esperantogazetoj, ke La Espero estas la plej bel- kaj prestiĝaspekta el la movadaj gazetoj.

Nun al la daŭrigo — al Karin Strandberg, pardonu, Lindquist. Kiam ni staris antaŭ la fakto ke ni bezonas novan redaktoron montriĝis, ke Karin por la momento disponas pri iom da libera tempo kaj havas spertojn redakti. Ŝi ne restos sola, sed havos 2—3 redaktohelpantojn. La unua persono kiu eniris estas Ulf Ribers el Motala. Li estas tamen pli okupita ol Karin, ĉar li jam estas pensiulo ...

Mi devas fine mencii, ke la intereso por esperanto rapide kreskis en Vilhelmina kiam Sven Jonsson el Uppsala prelegis en lernejoj kaj ĉe ABF. La kompatinda lerneja direktoro Jan Olof Ahlbeck mem devas gvidi kursojn.

Kerstin Rohdin, estrarano, diris al mi aŭtune: »Ĉi-vintre mi ne gvidos kurson» — tamen — nun ŝi gvidas 13 komecantojn. Ĉu malbona planado?

Roland Lindblom

### INNEHÅLL/ENHAVO

- 2 Ny redaktionskommitté
- 3 La prezidanto parolas
- 4 Esperanto-resmål 1984
- 5 UEA-kongreso
- 6 Vizio kaj energio. SEJU
- 7 Eldona — presentation av en 65-åring
- 8 Tra la lando
- 9 Opinio — la vorto estas libera
- 10 La instruistoj konferencis ...
- 11 Revuo de revuoj

#### LA KOVRILO

La partoprenantoj en la seminario en Medevi antaŭ unu el la ĉarmaj dometoj tie.

# Esperanto-resmål 1984

Varje år anordnas omkring 500 esperantoarrangemang i olika länder i hela världen. Det bästa sättet att lära ett språk är att tala det och det kan man göra på esperantoträffar. Där kommer man i kontakt med många olika personer, bland vilka en del blir ens mångåriga vänner.

**LÄR ESPERANTO!!!**

**LÄR KÄNNA VÄRLDEN!!!**

Här följer endast ett litet urval av välkända och omvittnat trevliga esperantoträffar, som det inte är så långt att resa till.

**Slottet Grésillon i Baúge** i mellersta Frankrike. I juli och augusti ordnar man språkkurser och utfärder. Man bor i 2-4 personer/rum. Man kan delta en eller två veckor.

Kostnad ca 1.000:--.

**Esperantovår vid Östersjön** i Mielno i Polen. En vecka i slutet av maj. Utfärder och kurser. Trogen kommer bibliotekarierna att träffas inom ramen för detta arrangemang. Man bor 2-4 personer/rum.

Kostnad ca 800:--.

**Midnattssol i Tromsø.** Alternativ, men redan i juni, till Universala Kongreso för europeiska esperantister. Utfärder. Man bor 2-4 personer/rum.

Kostnad: Ej bestämt än.

**Esperanto-ferie vid Svarta Havet "Oraj sabloj" i Bulgarien.**

Esperantokurser, bad och vila på de gyllene stränderna, bussutfärd till Varna m.fl. ställen. Man bor i turisthotell. Man deltar i tvåveckorsperioder fr.o.m maj t.o.m. september.

**20:e Internacia Esperanto-Feriado "Ora Pola Aŭtono" i Sudetbergen** i södra Polen. Kurser seminarier och utfärder. Två veckor. Man bor 2-4 personer/rum. Kostnad ca 1.100:--.

**Esperanto-Skola** för nybörjare och fortsättare i Chaux de Fonds i Schweiz och i Bydgoszcz i Polen (där man bor i internatskola). I Polen kostar en vecka ca 500:--.

## Årskongresser

**Västtyska årskongressen 6-8 april 1984 i Kassel.**

En del svenska som deltar i seminariet i Västtyskland deltar i den och ordnar en gemensam resa.

Kostnad: 30-35 DM, kongresskostnad plus uppehälle.

**Engelska årskongressen 25-28 maj 1984 i Weston Super Mare** (södra England). Utfärder till Bath. Promenader i den vackra Bristol-trakten. Man bjuder utlänningar på kongressavgift.

Kostnad: Upphälle.

**Polska årskongressen i Szczecin** i augusti.

Kostnad: Ca 700:-- inkl. båtresa från Ystad.

**Universala kongreso de Esperanto i Vancouver 21-28 juli 84.** Flygresa från Warszawa. Resan inkluderar några dagars besök i Warszawa.

Kostnad: Ca 1.000 dollar för flygresan. Vad man vill betala för uppehållet bestämmer man själv genom Dua Bulteno.

Anmälningar och förfrågningar: Kerstin Rohdin, Ålsta, 69072 Sköllersta, tel. 019-23 63 45.

**Planera sommaren under höstmörka kvällar!!!**



## I VANCOUVER ÄR DET KONGRESS 840721-28

Vancouver är en hamnstad som ligger i sydvästra hörnet av Kanada. I staden finns det gott om parker, t.ex. "Stanley Park", med djurpark, akvarium och blommor m. m.

I kvarteren som går under benämningen "China Town" finns ett flertal kinesrestauranger och för de som tycker om fisk finns en restaurang på skeppet "Seven Seas" som ligger för ankar i hamnen.

Under varma sommardagar kan det vara skönt att ta ett bad. Det kan man göra på den långa stranden, som för övrigt lär påminna om franska rivieran.

Bland utflykterna som ordnas under kongressen kan nämnas färder till trädgårdar och museer. En tur går till en gammal stad, och en annan till en kanjon i Fraserfloden där "Helvetets Port" ligger.

SEF ordnar en resa till kongressen. Vi åker cirka en vecka i förväg för att resa runt och titta lite på omgivningarna i British Columbia, den stat Vancouver ligger i.

Vi kommer att bo i studentlägenheter på universitetsområdet, där kongressen äger rum. Rummen är ordnade i grupper om sex, där varje grupp har ett gemensamt "vardagsrum".

Den exakta kostnaden för resan är inte SEF tillhanda vid pressläggningsögonblicket men den beräknas ligga mellan 12.000:-- och 15.000:-- kronor per person.

Anmälan sker genom inbetalning till SEF på postgirokonton 66 41 50-0.

OBS! I resan ingår anmälan till kongressen.

# Universala esperantokongreso en Vankuvero 21—28 julio 1984

La 69-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Vankuvero en Kanado. La Unua Bulteno aperis en oktobro. La kongreso okazos en la universitato de Brita Kolumbio, kiu havas belan, marbordan terenon ĉe la rando de la urbo Vankuvero. Tie, izolita de trafikiloj kaj aliaj kutimaj urbaj genejoj, disvolviĝos la 69-a UK.

## LOGEJOJ

Du grandaj apartamentaroj provizos la loĝlokojn por ĉiuj kongresanoj, kiuj deziras. Ne neceso fari longan, tagan vojaĝon de la loĝloko al la kongresejo. Manĝojn oni provizos en studenta restoracio. La ĉirkaŭaĵoj kaj la universitata etoso certe ravis kaj ri-pozigos la kongresanojn.


## KARAVANVOJAGO

SEF aranĝos kongresan karavanvojaĝon al Vankuvero. Ni jam nun donas mallongan informon pri ĝi sube. Vidu ankaŭ sub **ESPERANTO-RESMĀL 1984** — la karavanan vojaĝon de Pollando, pri kiu Kerstin Rohdin donas informojn.

## ALIAJ ARANĜOJ EN KUNLIGO KUN UK

14—20 julio: Turista antaŭkongreso en Montrealo.

7—21 julio kaj 28 julio — 10 aŭgusto: du ekskursoj en Usono, kiuj ebligas al la kongresanoj ekoni multajn partojn de Usono, gvidataj de esperantolingvaj ĉiĉeronoj. Oni vizitos ne nur turismajn vidindaĵojn, sed ankaŭ la hejmojn de lokaj esperantistoj survoje.



## KOTIZOJ

Ekde nun validas nova Kongresa Regularo, kiu forigas duonon de la antaŭaj kategorioj. Ĝi ankaŭ enkondukas la koncepton de »kunulo« loĝanta samadrese kun jam aliĝinta kongresano. Kunulo pagas 25 % malpli.

Vankuvero oferas  
belajn  
kaj plej diversajn  
ekskursojn

## *Dankon al Franko!*

Franko Luin dum pluraj jaroj prizorgis La Esperon. Li kolektis materialon, kompostis, paĝigis kaj presis la gazeton — do li faris ĉion. Kaj spertuloj laŭdis la aspekton de la sveda esperanta gazeto!

Pro labora kaj familia kaŭzoj (eta Janko volas kelkfoje vidi sian patron) li nun eksiĝis kiel redaktoro de La Espero.

Sed li promesis doni diversajn helpojn al la nova komitato por La Espero, por kio ĝi estas tre dankata.

# Eldona - presentation

av en 65-åring

En viktig del av det internationella kulturutbyte som sker genom esperanto förmedlas genom litteraturen.

De många små esperantoförlagen världen över arbetar under helt andra förhållanden än vanliga förlag. Den del av verksamheten som minst skiljer sig från vanlig förlagsverksamhet är läroboksutgivningen, såtillvida att man framställer en produkt att i främsta hand försälja på den allmänna marknaden inom sitt eget land. Men det är skillnad på upplagor. Övrig produktion riktar sig med större eller mindre framgång mot export.

Många av förlagen fungerar också som återförsäljare av varandras utgåvor.

Eldona Societo Esperanto eller Förlagsföreningen Esperanto upa bildades 1918 och har som ändamål "att främja medlemmarnas ekonomiska intressen genom att förlägga och försälja skrifter på eller om det av D:r L. L. Zamenhof år 1887 offentliggjorda internationella språket Esperanto".

Medlemmarna – vilka är de? Ja, genom köp, gåvor och arv under de gångna 65 åren har andelsinnehavet koncentrerats till SEF. Men till det facila priset av tio kronor (!) per andel kan vem som vill bli medlem.

Förlagets verksamhet leds av en styrelse på fem personer och två aktiva suppleanter. Dessutom deltar medlemmar i Malmö, Göteborg och Stockholm regelbundet i pågående arbete.

Förlagets egen utgivning är möjlig tack vare ideella insatser från i princip första till sista momentet i en boks tillblivelse. Sant, åtminstone så långt att vi på sista tiden provat att bara lägga tryckning av omslaget utanför vår organisation (men en

esperantist jobbar förstås på det tryckeriet). Anledningen till detta är givetvis att kunna få en produkt till rimligt pris trots de små upplagorna.

Bland de "stora" böckerna från förlaget kan nämnas verk av Lagerlöf, skildringarna om Kontiki och Andréés luftfärd, samt Martinssons "Aniara".

När det gäller förmedling av böcker från andra förlag har sortimentet breddats betydligt sedan EsperantoCentro öppnades för tre år sedan. Sista året har också förlagets lokal i Malmö ställts iordning så att en besökare kan känna sig välkommen. Dessa två lokaler är mycket viktiga för förlaget och för den svenska esperantorörelsen. Det är ju här som den intresserade allmänheten kan slinka in och få en smakbit av esperanto.

Men tillbaka till förlagets ändamål: främja medlemmarnas ekonomiska intressen o.s.v. Lönar det sig att vara medlem? Nja, skall sanningen fram, så bjuds inga speciella medlemsförmåner. Verksamheten syftar till att gå runt och prissättningsmodellen justeras med hänsyn till porto-omläggningar och försäljningsframgångar så att alla kunder, medlemmar eller inte, får vara med och dela kakan.

Varför är man då medlem? Ett skäl så gott som något kan vara att man är intresserad och vill vara med och påverka förlagets arbete. För varje andel har man en röst (med begränsningen högst 10 procent av representerade andelar) vid förlagsstämman som hålls i samband med förbundets årsmöte.

65-åringen är vid god vigör och kan dessutom bli starkare, genom fler medhjälpare för över-



## Kontakto - även för nybörjare!

### Litteraturkommentar

"... barn och nybörjare är två olika slags litteraturkonsumenter." Så skrev Klaus Schubert i en recension i Revuo Esperanto i oktober 1982. En sanning, som många är medvetna om, men som det ter sig svårt att göra någonting åt inom ett sådant kulturområde som esperantorörelsen, där en mycket stor del av kulturkonsumenterna inte behärskar språket flytande.

### Kontakto – fyra nivåer

I år har emellertid Universala Esperanto-Asocio och Tutmonda Esperantista Junulara Organizo tillsammans försökt att göra någonting åt detta. TEJO:s gamla tidning "Kontakto" har övergått i UEA:s och TEJO:s gemensamma ägo. Den kommer ut sex gånger om året. Varje nummer innehåller sexton sidor, varav hälften består av lättare texter. Texterna indelas i fyra nivåer som utmärks av olika symboler. De lättaste texterna förutsätter

sättning, korrekturläsning m.m. eller genom fler andelar. Vill du bidra, så hör av dig till Esperanto-Centro per telefon, eller sätt in ett antal tior på förlagets postgiro 578-5 och skriv att det gäller andelar.

ett ordförråd på 520 ord och de något mindre lätta ett på 1000 ord. Även den svåra delen av tidningen indelas i två nivåer, nämligen "inte särskilt lätta" och "svåra texter".

### Olika teman

"... bar och nybörjare är två olika slags litteraturkonsumenter." Denna mening förtjänas att upprepas ännu en gång. Trots att halva Kontakto är skrivet med ett språk som är avpassat för nybörjares språkkunskaper, är det inte meningen att tidningens innehåll på något sätt skall vara avpassat för barn. Nej, även de lätta artiklarna skall innehålla sådant som kan intressera och väcka till debatt. Teman som har behandlats i Kontakto under 83 år t.ex. bostäder, tolerans, 1984 (innehållet i boken med samma namn). Under 1984 kommer Kontakto bland annat att handla om religion, ekonomiska kooperativ, människan och maskinen, upptäcksfärder och brottslighet.

### Prenumerera på Kontakto

Vare sig du är nybörjare och vill lära dig esperanto bättre men inte har lust att läsa barn- eller läseböcker, eller en erfaren esperantist som gärna vill läsa på esperanto men inte om esperanto, så bör du tänka på att Kontakto kanske kan vara något för dig. Om du vill prenumerera på Kontakto för 1984 kan du sätta in 49:50 på postgiro 59 67 68-2, Esperantoförlagets prenumerationskonto.

*Leif Gunnar Nordenstorm*

40-A IJK DE TEJO, 13-20  
julio 1984.

La Junulara Kongreso okazos  
en SWANWICK - en nord-  
orienta Britujo.

Adreso de la IJK:  
Esperanto Centro, 140,  
Holland Park Avenue,  
London W11 4UF, Britujo.

# Vizio kaj energio

## — pri Harald Thilander

La 13an de decembro pasis 25 jaroj post la forpaso de la redaktoro, eldonisto kaj brajlopresisto Harald Thilander. Ekde 1901 ĝis sia lasta horo en la tago de Luĉio 1958 li idealiste kaj profesie laboris per kaj por esperanto.

Blinda kaj parte surda la naŭjara Harald estis sendita al Eugeniahemmet en Stockholm. La jaro estis 1886. (Kiel plenkreskulo li perdis la reston de la aŭdopovo.) Post plua malsano lia maldekstra mano estis difektita. Kiu atendis »utilan vivon» de tiel batita homo? Jes, Harald mem. Kun animo kleron soifanta kaj kun energio eksterordinara li ne povis kontentiĝi pri dumviva restado en tiu hejmo.

Helpe de vidanta kamarado li propramane kopiis en brajla skribo (punktskribo) lernolibrojn, unuavice pri lingvoj. Baldaŭ li ekhavis vizon ke internacia lingvo donus al la nevidantoj de la mondo gravajn avantaĝojn — pli granda legantaro en komuna lingvo donus pli bonan bazon por eldonado en brajlo, internacia lingvo ankaŭ estus utila interkomunikilo por tiu grupo kun multaj komunaj intereso. Post rifuzo unue de la latina, poste de la angla lingvoj li 1901 ekaŭdis pri esperanto. Li tuj komprenis ke li nun trovis la ĝustan lingvon.

Samtempe la franca filologo Théophile Cart (konata ankaŭ en la ĝenerala esperantomovado) interesiĝis pri esperanto kiel rimedo por la blinduloj. La vidpovo de lia filo estis minacata de grava okulmalsano. Thilander kaj Cart ekkomencis fruktodonan kunlaboron. Kiam Thilander estis adaptinta la brajlan alfabeton al esperanto, Cart 1904 povis fondi la internacian brajlorevuon Esperanta Ligilo. Tiu revuo verŝajne estas la plej malnova daŭre aperanta internacia esperantorevuo.

Mallonge rakontite? Helpe de amikoj kaj subtenantoj Thilander lasis Eugeniahemmet 1907 kaj sukcesis starigi modestan brajlopresejon en Stockholm. Kiam li post kelkaj jaroj transprenis la presadon de ĉesinta presejo, li havis sufiĉan ekonomian bazon. La redaktadon kaj presadon de Esperanta Ligilo li transprenis 1912 kaj lasis ĝin denove al Francio kelkajn monatojn antaŭ sia morto. Multaj revuoj kaj libroj en esperanto estis presitaj en la presejo — unue en malgranda ĉambraro en Östermalm en Stockholm kaj post 1927 en vilao en Stocksund.

Per esperanto li ankaŭ havis kontaktojn kun multaj landoj kiuj post la unua mondmilito havis malfacilaĵojn pri la brajlopresado. Pro tio li presis gazetojn en pluraj naciaj lingvoj. La kondiĉo estis ke la mendinto garantiis pri senerara manuskripto. La horon antaŭ sia morto en aĝo de 81 jaroj li propramane pretigis la revuon de la germanaj blindaj esperantistoj.

Inter liaj unuaj helpantoj kaj subtenantoj estis la blinda pianopedagogino Karin Höjer. Kun ŝi li edziĝis en 1919. Post ŝia morto en 1927 venis nova fidela kunlaboranto kaj vivkunulino el Finnlando, Varma Järvenpää. Post la morto de Harald Thilander lia dua edzino daŭrigis lian verkon ĝis la mezo de la 70-aj jaroj. Varma Thilander ankoraŭ vivas, sed kuŝis dum kvin jaroj en malsanulejo. La geedzoj Thilander vizitis multajn kongresojn kaj estis veraj kolonoj en la esperantomovado inter la nevidantoj.

# Tra la lando

## Suda regiono

### DAN-SVEDA TAGO

La 39-a Dan-Sveda Esperanto-Tago okazis ĉijare en la mez-epoka urbo Ystad kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. La svedaj partoprenantoj kolektiĝis en Malmö por bonvensaluti la danajn geamikojn. Aŭtobuso poste transportis nin tra la belega pejzaĝo de la suda Skanio preter la malnovaj kasteloj Charlottenlund, Marsvinsholm kaj Krageholm. Dumvoje ni ankaŭ faris paŭzojn en Anderslöv por viziti butikon kun skaniaj manfaritaj artaĵoj kaj manĝi lunĉon en la gastejo de Skivarp. Unu el la ĉefpunktoj en la programo estis vizito en la tre moderna kaj fama bovinejo de la grandbieno Högesta. Tie ni aŭdis pri la plej moderna formo de bovinbredado kie preskaŭ ĉio funkcias pere de komputilo. Post tiu vizito ni daŭrigis al Ystad, kie ni, post kaftrinkado kaj diskutado de komunaj demandoj, faris etan promenadon tra la malnova urbo kun ĝiaj 200 trabfakaj konstruaĵoj, antaŭ ol la aŭtobuso denove veturigis nin al Malmö kaj la pramo al Kopenhago.

### SEMAJNFINA KURSO

Suda Distrikto de SEF denove aranĝis intensivan semajnfina kurson. Ĝi okazis 8—9 okt. en la kursejo Klinta apud Höör. Kun vera ĝojo ni aranĝantoj konstatis ke tiuj, kiuj jam partoprenis la unuan aŭ duan ŝtupon, revenis por antaŭeniri. 30 personoj partoprenis, dividitaj en tri grupoj. Ni nur bedaŭras ke ni devis rezigni pri la kvara grupo, planita por tiuj kiuj volis sin prepari por alta ekzameno. Nur unu persono aliĝis al tiu grupo.

Lisbeth Andreasson

## Norda regiono

### SEMAJNFINA KURSO EN UMEÅ

En la reĝimo de Medborgarskolan iniciate de Ivar Nilsson okazis semajnfina kurso en Umeå la 24-an kaj 25-an de septembro.

Ege ĝojiga estis la intereso, kiun la partoprenantoj junuloj montris. Ĉe la fino de la kurso ili decidis starigi SEJU-sekcion en Umeå kaj tuj turni sin al la kamaradoj en siaj gimnazioj por veki intereson. Ingemar Nordin, kiu estis la instruisto de la kurso, promesis informi al la estraro de SEF kaj proponi, ke reprezentantoj de SEF venu al Umeå por kunhelpi en la starto.

La semajnfina kurso en Umeå instigas al imito en aliaj lokoj laŭ simila modelo:

1. Iu studorganizo aranĝas kaj anoncas la kurson.
2. La loka klubo aŭ SEF informas pri la kurso al informpetantoj en la regiono.
3. La tagojn antaŭ la kurso iu informas pri esperanto en la lokaj lernejoj.
4. Eventuala posta kunhelpo de SEJU.

## Nordokcidenta regiono

### SOMMAR I ÅRJÄNG (Somero en Årjäng)

La rubriko estas la nomo de turisma revuo, kiun redaktas kaj prirespondekas Bertil Danielsson. Ĉijare ĝi venis kun teksto en kvin lingvoj, unu el tiuj esperanto. En la esperantopaĝo oni memorigas pri la mondkongreso de la Freinet-instruistoj okazinta en Årjäng antaŭ kvin jaroj. Bertil kiel lerta fotisto ilustras la tekston per la plejeble bela foto de la kongreso.

Oni povas akiri la revuon senkoste. Skribu al

»Sommar i Årjäng»

Box 78

672 00 ÅRJÄNG.

Konvene je la kvinjarjubileo venis ankaŭ »La hoko-trolo»:

En la Freinet-klasoj la presejo ludas gravan rolon. Oni presas la skribaĵojn de la lernantoj por ke aliaj klasoj, gepatroj ktp. povu legi ilin. De tempo al tempo la internacia Freinet-organizo presas »albumon» faritan de iu klaso. Dum la kongreso en Årjäng instruistino tie, Gun Myrén, ricevis la komision igi sian novan klason de komencantoj pretigi albumon. Tio okazis, kaj nun estas presita *La hoko-trolo*, fabelo de la infanoj en Årjäng, multkolora kaj kun teksto en sveda kaj esperanto, kaj infanoj de Freinet-klasoj en ĉiuj landoj povas legi ĝin.

La albumo estas aĉetebla en Esperanto-Centro. Prezo 23 kr.

## Centra regiono

### SEMINARIO PRI FEDERACIA RESPUBLIKO GERMANIO en Medevi Brunn 1983—09—17—18

En la distrikta kunveno dum la SEF-kongreso en Gävle ni en la centra distrikto decidis aranĝi seminarion pri certa lando. Ĉar la klubo en Västerås havas bonajn kontaktojn kun samideanoj en Kassel — ĝemelurbo de Västerås — ni tuj akceptis ilian proponon elekti Okcidentan Germanion kiel studobjekton. Ili sukcesis persvadi Elsbeth Bormann, la antaŭa prezidanto de Germana Esperanta Asocio (GEA), esti la gvidanto de la seminario, kaj la klubo en Motala aranĝis ĝin dum pluvega semajnfino de septembro.

### VIRINA AGADO

Sinjinoro Bormann, kiu dum la restado en Svedio ankaŭ vizitis la klubojn en Göteborg, Örebro kaj Norrköping, faris ege profundan kaj interesan prezentadon pri preskaŭ ĉiu flanko de la vivo en



sia hejmlando, la duan tagon ĉefe pri familiaj kaj virinaj demandoj kadre de aranĝo de »Virina agado«. Si vere estas persono meze de la kultura kaj politika vivo de FRG. Ŝi i.a. estas parlamentano de la landa (t.e. gubernia) parlamento de Hamburgo kaj antaŭ kelkaj jaroj ricevis la honoran krucon de la respubliko, sufiĉe malofta distingajo por virinoj. Tial la scipovoj pri la temo abundas, sed eĉ pli grave estas ke ŝi kun tia entuziasmo kaj bonhumoro povas prezenti ankaŭ la plej sekajn ciferojn. La 25 partoprenantoj de la seminario povis konstati tion dum ŝia entute 8-hora prezentado. Impona estas la ĝusta vorto por karakterizi tian laboron.

### KURSOJ

Flanke de la seminario ankaŭ okazis diversnivelaj kursoj i.a. tri por komencantoj kiujn partoprenis ankoraŭ trideko da personoj.

### AL KASSEL EN APRILO

La aranĝantoj, precipe do mi pensas pri Ulf Ribers, Motala, Kerstin Rohdin, Örebro kaj Gunnilla Sundholm, Västerås, meritas grandan dankon de ni partoprenantoj. Feliĉe la studadon pri la temo FRG ni daŭrigos en Västerås la 10-an de marto venontjare, kaj poste almenaŭ kelkaj de ni intencas studi la aferon surloke en Okcidenta Germanio dum la jarkunveno de GEA en Kassel en la unua duono de aprilo 1984.

*Haldo Vedin*  
Norrköping

## TACK

Synskadade esperantistoj i Sverige har i gáva fått närmare 19.000 kr. Givarinnan är Anny Östensson, Stockholm.

Vad pengarna ska användas till är ännu inte bestämt, men sannolikt kommer en stor del att användas för utgivning av litteratur.

# OPINIO

Det här är vår insändarspalt. Har du funderingar som angår Esperanto så skriv till oss.



Äntligen har jag kommit mig för. Med vad? Jo att gå en nybörjarkurs i esperanto. Kursen hölls i samband med en större träff för erfarna esperantister. Jag trodde i min enfald att jag skulle hamna i ett sällskap, som pratade ett »främmande» språk och att jag, som inget begrep, skulle känna mig lite utanför. Till en del var det nog det som gjorde att jag tvekade så länge att börja. Det är kanske ett fenomen som man bör tänka på i rekryterings-sammanhang.

Nå, hur var det då i verkligheten? Jo, så mycket trevligt folk, med den allra största förståelse för min brist på kunskande och så hjälpsamma, har jag inte träffat på länge. Inte fanns det av det skälet någon anledning att tveka att lära sig esperanto – tvärtom.

Under kurstiden diskuterades mycket utbildningsfrågor. Flera olika pedagogiska filosofier ven-


tilerades. Men var än en diskussion utspann sig, så handlade det hela tiden om språkutbildning. Det var det som gjorde mig så förvånad och kanske lite betänksam. Delvis är det kanske en förklaring till att jag på mitt jobb och även i andra sammanhang har fått höra de mest underliga inställningar till esperanto, när jag fört det på tal. Nästan ingen vet något! Och det de tror sig veta är nästan skrämmande felaktigt. Jag tror att det är hög tid, att ledningen inom svenska esperantorörelsen, tar fram ett utbildningspaket, som inte bara innehåller språkutbildning utan i mycket hög grad trycker på marknadsföring, utställningsteknik, presentationsteknik, ja all tänkbar utbildning som går ut på att lära klubbmedlemmarna att föra rörelsen framåt. Ingen sitter väl och tror att beslutet att lära sig ett nytt språk, är en studentens ingivelse. Man måste vara motiverad – kraftigt motiverad.

Från min novishorisont kan jag inte förstå annat än att esperantorörelsen borde ha vind i seglen i dagens samhälle. I en alltmer »krympande» värld är ju behovet av kommunikation skriande. Flera internationella rörelser har språkproblem. Datorindustrin har problem med programspråken och alla dess dialekter.

Till allt detta kan man ju tillägga allt vad gemene man kan få ut av språket och rörelsen.

Det finns massor av goda skäl till att lära sig esperanto.

*Nybörjare*



# La instruistoj konferencis en Sintra

## 14 LANDOJ PARTOPRENIS

La 17-a konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.) okazis ĉi-jare en Sintra, Portugalio. Partoprenis reprezentantoj el 14 landoj.

Sintra estas bele situanta urbeto ĉirkaŭ 30 km okcidente de Lisbono. La regiono estas iomete montara, kaj oni povas de la urbo rigardi la suban ebenajon, kiu kondukas al la Atlantika maro blue brilanta en la suno. Mirinde bela! De la maro blovas freŝaj ventoj kaj pro tio la klimato estas agrabla kaj ne tro varma.

La ĉefa temo de la konferenco estis »Etnaj lingvoj en Eŭropo kaj Esperanto«. La prezidanto de I.L.E.I., rektoro Helmut Sonnabend, pritraktis tiun temon en sia festa parolado dum la konferenca inaŭguro, kiu okazis en Palaco Valencia. Salutis la konferencan reprezentantojn de la diversaj landaj sekcioj kaj de enlandaj organizoj kaj institucioj. Por UEA salutis s-ino Emilija Lapenna.

## DIVERSAJ LABORGRUPOJ

Dum la konferenco laboris pluraj laborgrupoj. Unu grupo, gvidata de s-ro Marin Bacev, Bulgario, okupis sin pri didaktikaj helpiloj. Alia grupo formis seminarion pri Freinet-metodo kaj estis gvidata de s-ino Marcelle Turin kaj s-ino Vincent Janine el Francio. Oni uzis la novan libron pri Freinet-pedagogio »La diroj de Mateo«. Tria grupo, dvidata de s-ino Emilija Lapenna, pritraktis la temon »Parolarto«. Elementa lingva kurso ankaŭ laboris.

## LA LAPONOJ

Interesaj prelegoj ankaŭ apartenis al la konferenca programo. S-ro Wilhelm Theodor Oeste, kiu i.a. tradukis la Frithiofsagaon al esperanto, prelegis pri

»Esence propraj kvalitoj de esperanto en komparo kun etnaj lingvoj».

S-ro Mario Eusebio prelegis pri »La lerneja sistemo en Portugalio» kaj pri »La origino de la portugala lingvo».

Profesoro So Gilsu el Suda Koreujo prezentis la situacion de esperanto en lia propra lando kaj parolis pri denaskaj esperantistoj. Mi parolis pri »La laponoj — vivkondiĉoj kaj lingvo».

S-ro Mirka Marcetta, Italio, kaj s-ino Orsika Kiss, Hungario, gvidis kurson pri Nova Skribo. Interesa novaĵo, en kiu oni per specialaj signoj povas facile kaj rapide desegni ĉiun sonon en ĉiu lingvo.

## LA ESPERO

Unu vesperon sur la ŝtuparo de la antikva reĝa palaco honore al la konferencanoj la infana ĥoro »Liga dos Amigos de Queluz» kantis kanzonojn en portugala lingvo kaj en esperanto. Inter

## Korespondado

Mi estas Jozefo Helmeczy kaj loĝas en Ĉeĥoslovakio. Mi estas 18-jara. Mi tre volus korespondi kun geknaboj 17—19-jaraj. Skribu al Helmeczy József, Kisgéres 183, ĈS—076 52 Tjeĥoslovakien.

Mi volus korespondi kun svedaj junulinoj (18—25-jaraj). Mi interesiĝas pri vojaĝoj, teatro, popoloeduko, ĝardenkulturo, muziko. Mia adreso: Galazek István, 1376. BUDAPEST. 62, Postán maradó, Ungern.

kiuj tri foje la himnon »La Espero» kiun la geesperantistoj entuziasme kunkantis.

## EKSKURSOJ

La konferencanoj ankaŭ ekskursis. Oni vizitis la antikvajn restaĵojn, la botanikan ĝardenon, malnovan monaĥejon kaj belan kastelon en la ĉirkaŭaĵo. La ekskursanoj ankaŭ vizitis la plej okcidentan parton de la Eŭropa kontinento, Cabo da Roca, kie ĉiuj ricevis specialan diplomon skribitan en pluraj lingvoj i.a. en esperanto.

Dum la tuttaga ekskurso oni vizitis la ege interesan sanktejon de Fatima, al kiu amasoj da pilgrimoj venas por serĉi helpon por malsanoj. Alia interesa celo de la ekskurso estis la plej malnova universitato de Eŭropo en Coimbra, kie la vicrektoro afable bonvensalutis la partoprenantojn kaj montris al ili la interesan kaj altvaloran bibliotekon. La ekskurso ankaŭ venis al Konimbriĝa, ege interesaj Romiaj restaĵoj.

## REZOLUCIO

La konferenco aprobis rezolucion, kiu ĉefe direktas sin al Unesko kaj al aliaj kun ĝi kunlaborantaj organizoj.

La venontjara konferenco de I.L.E.I. okazos en Ŝkofja Loka, Jugoslavio, la 14-an — la 22-an de aŭgusto 1984.

Bertil Andreasson

Mi deziras korespondi en esperanto. Mi estas profesoro. Miaj studentoj plejparte estas estontaj instruistoj. Mi interesiĝas pri diversaj temoj: edukado, verkado, literaturo, filozofio kaj nuntempaj eventoj. Mi studis la germanan. Mi studas la hispanan kaj nuntempe ankaŭ esperanton. Lingvoj tre interesas min. Origine mi estas de Novjorko, sed loĝas nun en Teksaso. Antaŭ pluraj jaroj mi estis en Koreujo kaj Japanujo kiam mi estis en la aerarmeo. Skribu al: Richard Swerdlin, profesoro, College of Education, North Texas State U., Denton, Texas 76203, USA.

## Revuo de revuoj

**Bona Espero** eldonata de Sudafrika Esperanto-Asocio, ricevis novan redaktoron (Zeelic). La malnova redaktis la revuon dum 18 jaroj. Ĉar oni ne havis sufiĉe da propra materialo oni pruntis el Kontakto 3/82 la artikolon de Golden: Rivaleco inter Volapuko kaj Esperanto, kaj el Bulgara Esperantisto 11/82 Kia esperantisto vi estas: Bonan-tagon-esperantisto, filatelist-esperantisto ktp.

Krome ili redonis la poemon Estas mi esperantisto. Sub ĝi staras (Poeto nekonata)! Interesa noto estas: Gaile Parkin ricevis la gradon Majstro pir Arto en la departemento de lingvistiko sub profesoro Aldridge ĉe la Universitato de Witwatersrand por la 189-paĝa disertacio »The Linguistic Structure and Sociological Foundations of Some Major Auxiliary Languages». (Bona Espero 3/83).

**El Popola Ĉinio** ĉiam ravas nin per siaj belegaj bildoj kaj interesas pro aktualaj raportoj. Ili informas pri la veterana esperantisto Tikos, kiu jam en 1929 fondis esperantistan societon en Hankaŭ kaj en sia tuta vivo laboris por esperanto, eldonis revuojn, fondis societojn, instruis. Alia rubriko en sama numero: Esperanto devas esti uzata en sciencoj kaj ĉiutaga vivo, de Io Chou, alia veterano en la movado. (El Popola Ĉinio 10/83).

**Alumeto** estas la nomo de informbulteno eldonata de Kanada Esperanto-Asocio. La 69-a UK ja okazos en Vankuvero, Kanado. La bulteno enhavas i.a. artikolojn pri la ĉi-somera landa kongreso, pri mondfederalismo kaj pri la Internacia Jamboreo de la skoltoj, kiu okazis en Kanado. En tiu oni starigis specialan

tendon de Skolta Esperantista Ligo, kie oni informis pri esperanto kaj pri la ligo. KEA eldonas ankaŭ la revuon **Lumo**. (Alumeto sep 83).

**Sennacieca Revuo** estas eldonata de SAT (Sennacieca Socio Tutmonda). Ĝia lasta numero enhavas longan interesan artikolon de Bernhard Golden: La süahila lingvo kaj esperanto. Li montras ke la du lingvoj (pontlingvoj) renkontis similajn obstaklojn kaj antaŭjuĝojn dum sia historio. La historio de la süahila estas multcentjara, kaj laŭ Golden ĝi jam venkis, estante la oficiala lingvo de Tanzanio kaj Kenjo. En la sama numero ni renkontas konaton: Zofia Banet-Fornalowa skribas pri Janucz Korczak, temo de ŝiaj prelegoj en Svedio. (Sennacieca Revuo n-ro 111).

**Hungara Vivo**, eleganta kultura revuo eldonata de Hungara Esperanto-Asocio. Ĝi daŭrigas la serion »Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado», ĉi-foje per »Sovetaj radikoj». Kompreneble, oni preskaŭ volas diri, tie vi trovas tradukojn de poemoj de Sándor Petöfi, la plej glorita nacia poeto hungara. Omaĝon al UEA pro 75 jaroj prezentas Georgi Mihalkov. (Hungara Vivo 4/83).

**Internacia Jura Revuo (IJR)**. Ek de 1966 aperadas *Internacia Jura Revuo*, sendube unu el la plej gravaj fakaj periodaĵoj en la internacia lingvo. La revuo estas la organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ). Ĝi aperas du fojojn jare kun varia enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro.

Salex



# Ett språk i FN?

Ett upprop i språkfrågan Världskommunikationsåret 1983

**Basen för kommunikation — ett språk.** Alla människor bär på tankar som kan bidra till fred. Freden blir möjlig när alla dessa tankar och förhoppningar blir kända och kan diskuteras av alla. Freden blir möjlig när alla kan tala med varandra, förstå varandra.

Språket är människans viktigaste kommunikationsmedel. Ett gemensamt språk skulle riva hinder och öppna hela jorden för samtal. För att freden ska bli möjlig måste vi alla kunna tala samma språk. Detta språk ska jämställa alla. Det får inte vara någons modersmål, men alla ska kunna lära sig det vid sidan av modersmålet.

Det finns ett sådant språk: esperanto. Esperanto diskriminerar inte någon. Esperanto ger samma möjligheter till kommunikation för alla.

Idag talas omkring 3 000 språk på jorden. Några av dem har av mäktiga nationer gjorts till "internationella språk". Det betyder att våra medmänniskor i Tredje världen fortfarande tilltalas på den forna kolonialmaktens språk. Det betyder att det vid varje internationellt förhandlingsbord finns överlägsna och underlägsna deltagare, allt efter hur väl de behärskar förhandlingsspråket. Med hjälp av tolk kan de möjligen hålla tal, men inte samtala förtroligt.

I vårt största mellanfolkliga forum, Förenta Nationerna, har sex språk upphöjts till officiella språk. Majoriteten delegater kommer i underläge gentemot dem som har de officiella språken som modersmål. I medvetande om denna diskriminering och om andra problem som bygger barriärer mellan människor och nationer har FN utsett 1983 till Internationella året för kommunikation.

Esperanto talas och skrivs redan av människor över hela jorden. Men det krävs politiska beslut för att göra det till officiellt världsspråk, ett andra språk för alla.

Vi uppmanar alla att delta i arbetet för ett världsspråk.

**Ingemund Bengtsson**  
talman

**Tomas Magnusson**  
ordf. Sv. Freds- o. Skiljed.för.

**Allan Gut**  
docent

**Lars E Olsson**  
byråchef

**Karl Söderberg**  
f.d. skoldirektör

**Inger Holmlund**  
"Framtiden i våra händer"

**Hans Granqvist**  
redaktör

**Bengt Lindqvist**  
riksdagsledamot

**Rolf Höök**  
universitetlektor

**Stanley Bloom**  
redaktör

**Britta Carlberg**  
gymnasierector

**Sven Andersson**  
f.d. statsråd

**Sven G Svensson**  
fil. dr

**Tony Hagström**  
generaldirektör

**Marianne Nivert**  
teledirektör

**Jan-Erik Wikström**  
riksdagsledamot

**Christer O Kiselman**  
professor

**Ingemar Kaj**  
universitetsassistent

**Dorcas Norre**  
tonsättare

**Bengt Göransson**  
statsråd

**Jörgen Lantz**  
skådespelare

**Bo Lindblom**  
författare

**Jan Treby**  
byråchef

**Arne Lundberg**  
kommunfullmäktige ordf.

**Sören Leimar**  
särskolechef

**Göran Strandberg**  
utbildningsledare

**Kent Larsson**  
professor

**Ingvar Carlsson**  
bitr. statsminister

**Sven Hulterström**  
kommunfullmäktige ordf.

**Kim Bastin**  
översättare

**Daniel Tarschys**  
docent, författare

**Jan-Olof Ahlbeck**  
skoldirektör

**Curry Melin**  
meteorolog

**Ingrid Andersson**  
riksdagsledamot

**Tove Skutnabb-Kangas**  
språkforskare

**Jarl Hammarberg**  
författare

**Alf Svensson**  
partiledare

**Bo Martinsson**  
generaldirektör

**Pierre Fränckel**  
teaterchef

**Per Ragnar**  
skådespelare

**Jan Bergqvist**  
skådespelare

**Evert Svensson**  
riksdagsledamot

**Johnny Andersson**  
universitetsdirektör

**Erik Carlén**  
disponent

**Ruben Enocson**  
direktör

**Maj-Britt Theorin**  
riksdagsledamot

**Erik Ransemar**  
författare

**Roland von Malmborg**  
trubadur

**Ragnar Edenman**  
f.d. statsråd, landshövding

**Lars Carlzon**  
biskop

**Robert Phillipson**  
lektor

**Håkan Källén**  
journalist

**Birgitta Söderlund**  
kommunalaråd

**Lars G Lindskog**  
redaktör

**Karl-Erik Kronefalk**  
turistdirektör

**Eva P Paulsson**  
redaktör

**Carl-Henrik Hermansson**  
riksdagsledamot

**Stig-Arne Larsson**  
materieldirektör

**Sven Hegelund**  
utredningschef

**Anita Nilsson**  
sångpedagog

**Ebbe Vilborg**  
docent

**Bo Sandelin**  
docent

**Lars Ag**  
generaldirektör

**Hans Alsén**  
ordf. Kooperativa Förbundet

**Jan-Öjvind Swahn**  
professor

**Åsa Sahlqvist**  
universitetslektor

**Ebbe Grims-Land**  
tonsättare

**Helmer Ringgren**  
professor

**Tord Palmlund**  
generaldirektör

**Bengt Lindqvist**  
docent

**Björn Rosengren**  
ordf. TCO

**Erik Gamby**  
fil. dr, författare

**Sten Öfors**  
avdelningsdirektör

**Britt Mogård**  
riksdagsledamot